

# Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 13-an de januaro 2022 per Zoom

## Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Vidar Skretting, Marianne Lund.

### 1. Tagordo

Oni aprobis la tagordon.

### 2. Protokolo de la kunsido 09.12.2021

Marianne ne korektis la punkton pri subskribrajto en Brønnøysundregisteret, sed promesas fari tion baldaŭ. Krom tio – neniu komento pri la protokolo.

### 3. Ekonomio de NEL

Bård demandis la plej aktivajn membrojn de Bergen, ĉu ili aprobas, ke ni uzu la bergenan klubmonon (proksimume 10.000 kronojn) por pligrandigi la liberajn rimedojn de NEL. Ĉiuj demanditoj aprobis la ideon, do ni tion faros.

### 4. Telefona enketo al la membroj

Marianne komencis telefone kontakti membrojn, demandante pri ilia rilato al la laboro de NEL kaj al Esperanto ĝenerale (uzante la antaŭe priparolitan demandaron). Samtempe ŝi ĝisdatigas informojn en nia membrolisto, ĉefe retadresojn kaj poŝtelefonojn numerojn. La enhavon de la interparoloj ŝi notas provizore libere per ŝlosilvortoj, sed poste (eble) pli sisteme prezentos ilin en formato «Excel», se tio ŝajnos utila. Dek interparoloj estas jam faritaj. Oni decidis, ke Marianne daŭrigu la agadon, eventuale kun helpo de pliaj estraranoj.

### 5. Membroregistrado per Spond

Lars faris membroliston subaze de jam ekzistanta, ampleksa membrolisto. La listo de Lars enhavas malpli da informoj, sed estas pli klara kaj facile legebla. Ni decidis, ke ni unuavice ĝisdatigu la liston de Lars per aktualaj informoj. Pli poste ni decidis, kion fari pri Spond.

### 6. Landa kongreso 2022

La landa kunveno okazos la 4an kaj 5an de majo. La necesaj dokumentoj estu dissenditaj monaton antaŭe. Proponoj pri statutŝanĝoj estu ĉe la estraro antaŭ la 1a de marto. Bård priparolos kun Douglas, ĉu ni faru du numerojn de *Norvega Esperantisto* printempe (la unua enhavu ĝeneralajn informojn pri la kunveno, ekz. datojn kaj programon, la posta (aprila) la jarraporton), aŭ ĉu ni faru printempe tri numerojn (januare, aprile kaj junio).

Ni decidis, ke Bård demandu Espen Stranger-Johannessen kaj Stian Håkleiv, ĉu ili pretas kontribui al la neformala programo.

### 7. Amplekso de la estraro

La estraro faros proponon pri vortumo de eventuala statutŝanĝo por la landa kunveno. Ĉiuj estraranoj tralegu la statuton antaŭ la venonta estrarkunveno!

## **8. Reta instruado**

Ni planas organizi retan kurson per Zoom dum la printempo. Ni diskutis, interalie, ĉu la kurso estu por komencantoj, lernintoj ĉe *Duolingo* aŭ aliaj progresantoj, ĉu ĝi estu paga, eventuale inkluzivante lernolibron ktp. Vidar esploros, kiel trovi kaj eventuale inviti la lernintojn per *Duolingo*. Por ke la kurso povu komenciĝi baldaŭ, ni decidis daŭrigi la diskuton dum baldaŭa estrarkunveno mardon la 18-an de januaro je la 20-a horo.

## **9. Vigligado de NJE**

Prokrastita.

## **10. Jarraporto por 2022.**

Prokrastita. (Ĉiu plenumu sian parton de la laboro.)

## **11. Skandinava kongreso 2022**

Prokrastita.

## **12. Grasrotandelen**

Prokrastita.

## **13. Eventualaĵoj**

Prokrastita

Protokolis Marianne Lund